

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Inĝ R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 22

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JANUARO 1934

Post la morto de Grosjean-Maupin.

„Rezonanta penetremo de René de Saussure, la Analizanto,
Vivonaska intuicio de Antoni Grabowski, la Sintezanto,
Scienca diligento de Grosjean-Maupin, la Konservanto,
ke en akordo ili gvidu nin!“

Oni pardonu min, se mi ripetas vortojn, kiujn mi skribis antaŭ dekkelke da jaroj sur la unuan paĝon de mia Enciklopedia Vortaro. Ili volis diri, ke vane la verkistoj de Esperanto serĉus novajn esprimrimedojn kaj ke vane la teoriiistoj traesplorus ilin, se ne komprenkapablaj vortaristoj gardus la trovaĵojn de forgeso kaj fuŝo. En Grosjean-Maupin mi vidis tiun personon, kiu ekmetis la fundamentojn por vortara scienco de Esperanto.

Hodiaŭ verŝajne jam ĉiu esperantisto iom konscias, ke Grosjean-Maupin faris gravajn servojn al la sekura evolucio de Esperanto. Sed tute klare prijuĝi la Esperantan vivoverkon de la Foririnto oni povas nur, se oni superrigardas ĝian fariĝadon kaj la cirkonstancojn, en kiuj ĝi kreskis. Kiel ĉiu granda verko ĝi estas la grada, konsekvenca plikompletigo de komenca skizo.

Sian unuan vortaron Grosjean-Maupin publikigis jam preskaŭ kvindekjara, en la jaro 1910: Ĝi estis detala vortaro E—F (= Esperanta—franca).

Generale la jaroj ĉirkaŭ 1910 estis la epoko de la detalaj vortaroj. Aperis la vortaroj de Boirac (E—E, 1909), Bein (E—E, 1911) kaj Verax (E—E, 1910), de Robert (E—F, 1910) kaj de aliaj kunlaborantoj de la Presa Societo (F—E, 1908), De Rhodes (A—E, 1908) kaj Milidge (E—A, 1912), de Christaller (G—E, 1910), de Korzliniskij (R—E, 1910).

La vortaro E—F de Grosjean-Maupin ankoraŭ ne montris evidentan superecon super la aliaj detalaj vortaroj, sed tamen ĝi kaŭzis — neintence — sencion: Oni furioze riproĉis al ĝi senliman neologismemon (koncerne radikojn), kvankam ankaŭ en tiu rilato ĝi ne grave diferencis de la aliaj samtempaj vortaroj. Cart, tiam direktoro de la vortara sekcio de la Akademio, eĉ deklaris: „Tia vortaro estas ne nur malbona vortaro, sed ankaŭ malbona ago.“ La ĉefa defendanto de Grosjean-Maupin estis Bourlet, la vastrigarda direktoro de „La Revuo“. — Ju pli Esperanto

poste enpenetris en la praktikan vivon, des pli la tiama teoria neologismemo malaperis ĉe la vortaristoj. En la dua eldono de sia vortaro E—F (1921) Grosjean-Maupin forigis la plej multajn neologismojn de la unua eldono.

Pli grava ol la tuta ĵurnalista polemikado pri la neologismoj en la vortaro E—F de Grosjean-Maupin estis alia fakto: En antaŭparolo la aŭtoro detale kaj profunde esploris la problemon de la lingva evolucio. Li admonis, „ne forgesi, ke samaj kaŭzoj estigas samajn efikojn, kaj ke, se la internacia lingvo estas forlasita al la evoluado, kiun oni nomas natura, tio estas al la hazardoj de la senkonscio, ĝi nepre kaj devige ricevos ĉiujn malbonaĵojn de la naturaj lingvoj kaj rapide fariĝos tiel malsimpla, tiel malregula, tiel mallogika, tiel kaprica, kiel ili.“ Tio estas precize la sama instruo, kiun Bourlet en la kolonoj de „La Revuo“ averte kontraŭmetadis al la instruo pri la „natura evolucio“, propagandita de la skolo de Cart. Sufiĉas interkompari la supre menciitajn vortarojn, por konstati, al kiaj kaosaj diverĝoj kondukas plene libera evolucio. La detaligoj de Grosjean-Maupin kaj Bourlet ĉiam restas aktualegaj.

Grosjean-Maupin ne estis utopia babilisto. Li komprenis: Ne sufiĉas prediki al la homoj, ke ili faru ion; oni devas faciligi al ili la faron, kaj oni devas mem doni ago-elkzemplon. Ne sufiĉas diri al la homoj, ke ili ne uzu superfluaĵajn neologismojn, sed oni devas montri al ili taŭgajn esprimojn ekzistantajn; ne sufiĉas diri al la homoj, ke ili uzu ĉiuj la samajn esprimojn por la samaj ideoj, sed oni devas doni al ili ian normon por sekvi. Grosjean-Maupin do ekagis: Li eldonis en 1913 tre detalan vortaron F—E.

Tiu vortaro jam multege superis ĉiujn antaŭe ekzistantajn vortarojn naciajn—Esperantajn de aliaj aŭtoroj. (Simila anonima vortaro F—E, komencita en 1905, haltis jam ĉe la litero b.) Unue Grosjean-Maupin serioze konsideris, ke la ĉefa tasko de lingvo estas, transdoni

ideojn. La aliaj vortaristoj ĝis tiam vicigis post la nacilingva vorto grandan aron da Esperantaj esprimoj, kiuj proksimume reproduktas ĝiajn signifojn. Sed ili neniel ekzakte esploris tiujn signifojn, ili ne nete disigis ilin kaj ili neniel helpis la uzanton de la vortaro en la elekto de la plej taŭga esprimo.

Tradukado kun tia helpilo postulis subpremi ĉian emcon al nuancoj kaj al klareco de pensado. Komencanto, kiu ne lasis fortimigi sin per la vortaroj kaj volis tamen intimiĝi kun la spirito de la lingvo, devis tralegi mem grandan parton de la literaturo; malmultaj personoj havas tempon por tio. Grosjean-Maupin faris la savan agon: Li verkis vortaron de spirita nivelo, evitante la diritajn difektojn.

La dua difekto de la aliaj vortaroj estis, ke iliaj aŭtoroj tute arbitre tradukis la diversajn ideojn (naciajn vortojn), tute laŭ ilia momenta ekpenso, do ĉiu alimaniere. Sed ĉiu vivanta lingvo havas sian finman tradicion, kun stabilaj derivaĵoj, kunmetaĵoj, parolturnoj kaj tropoj. Vortaristo, kiu volas helpi traduki en lingvon vivantan, devas ĉerpi sian materialon ne el sia propra fantazio, sed el la vasta lingva tradicio. Antaŭ ol verki sian vortaron, li devas enkapigi al si (aŭ enlistigi) la lingvaĵon de la Biblio, de la gravaj literaturaĵoj, de la diversaj metioj. Kiu vortaristo havus rilate al Esperanto la tempon kaj kapablon por fari tion? Grosjean-Maupin kiel unua kaj sola faris tiun gigantan laboron por sia vortaro. Li ebligis eviti la ĝistiamajn diverĝojn, donante norman lingvaĵon: la lingvaĵon de Zamenhof kaj, kompletige, de la aliaj plej bonaj aŭtoroj. Kaj li eĉ citis ĉe tiuj normaj esprimoj ilian aŭtoron.

La saman sciencon metodon de material-prezento, kiun Grosjean-Maupin aplikis en sia vortaro F—E, li uzis jam en la kelkvoluma francilingva lernolibro de Esperanto, kiun li eldonis, kune kun Aymonier, en 1909.

Bedaurinde la vortaro F—E de Gros-

jean-Maupin estis destinita nur por francoj. Mi mem — kaj versajne ankaŭ aliaj nefrancaj esperantistoj — multe vastigis miajn sciojn pri la franca lingvo sekve de la konstanta devigo, uzi la vortaron de Grosjean-Maupin. Sed ankaŭ la nefrancojn Grosjean-Maupin ne forgesis por ĉiam: En 1930 li aperigis vortaron E—E. Ĝi donas difinojn por la esprimoj kaj tre ofte ankaŭ indikas ilian Zamenhof-econ. Per tiu vortaro Grosjean-Maupin, jam 67-jara, igis kompleta sian vortaristan laboron, vere kreas. Sajnas, ke antaŭ sia morto li povis ankoraŭ pretigi la manuskripton de dua eldono.

En 1920 Grosjean-Maupin fariĝis direktoro de la vortara sekcio de la Akademio; la ĝistiam direktoro — Cart — fariĝis prezidanto de la Akademio. La iamaj konfliktoj inter tiuj du viroj estis

cedintaj al lojala kunlaboro. Estas vere, ke Cart post sia elekto kiel Prezidanto dissendis cirkuleron, en kiu li programigis la naturan evoluon, kaj ke ankaŭ Grosjean-Maupin restis fidela al sia antaŭa konvinko. Sed Grosjean-Maupin ne kroĉis sin al vorto-fetiĉo pri la lingva evolucio, li komencis iom post iom surmeti al tiu evolucio bridon por direkti ĝin. La plej grava paŝo en tiu rilato estis la vortaro E—E. Kvankam Grosjean-Maupin verkis ĝin nur kiel privatulo, tiu verko ĝuas tiom da aŭtoritato, ke ĝi efikas kvazaŭ oficiala normo.

Ni esperu, ke la tradicio komencita de Grosjean-Maupin en tiel malfacilaj cirkonstancoj trovi indan daŭrigon. Antaŭli lian personecon oni vane provos.

E. Wüster.

Bibliaj esprimoj en Esperanto.

2)

De Joh. Hartog.

La arbo de vivo. — Genezo III, 9: Dio plantis ĝardenon en Eden, en kies mezo Li elkreskigis la arbon de vivo kaj la arbon de sciado pri bono kaj malbono. — De la laste nomita arbo la unuaj homoj manĝis kaj per tio perdis la rajton pri la paradizo, ĉar kiel Dio diras (Gen. III, 22): „Nun eble la homo etendos sian manon kaj prenos ankaŭ de la arbo de vivo kaj manĝos kaj vivos eterne“. — S. Johano skribas, ke tiuj, kiuj eniros la ĉielon, manĝos tie de la arbo de vivo (Apokalipso II, 7).

Metafore oni nun diras pri tiu homo: „Li certe manĝis de la arbo de vivo“ kaj celas per tio, ke tiu homo vivas tre longe.

La arbo de sciado. — Vidu la paragrafon pri „la arbo de vivo“.

Osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno. — Genezo III, 23: Dio kreis la unuan homon, sed vidante, ke tiu sola ne estas feliĉa, „Li faliĝis profundan dormon sur la homon, kaj ĉi tiu endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno. Kaj Dio la Eternulo konstruis el tiu ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita“.

Oni facile komprenas, ke la esprimo nun montras tujan proksimecon laŭ parenceco inter kelkaj homoj.

Lando en kiu fluas lakto kaj mielo. — Eliro III, 17: Kiam la hebreoj estis subpremataj de la egiptaj faraonoj. Dio aperis al Moseo, la homo, kiu estis destinita elkonduki la izraelidojn el la lando egipta, el la domo de sklaveco“ (Eliro XX, 1). Dio tiam promesas al Moseo: „Mi elrigos vin el la mizero de Egiptujo en la landon de la Kanaanidoj, en landon, en kiu fluas lakto kaj mielo“.

La esprimo indikas landon aŭ lokon de granda abundo.

Sidi super la potoj kun viando. — Eliro XVI, 3: Post kelkaj jaroj en Egiptujo, la izraelidoj efektive eliris el tiu lando (kp. supran paragrafon), sed pro misagoj ili devis resti en la dezerto longan tempon. Tie ili foje ne povis trovi la necesan nutraĵon kaj pro tio ili ribelis, dirante al sia gvid-

anto Moseo: „Ho, ni dezirus morti per la mano de la Eternulo en la lando Egipta, sidante super la potoj kun viando, manĝante ĝissate“.

Homo nun uzante la esprimon celas, ke li redeziras antaŭan tempon, kiu estis tre malfacila al li, sed kiam li almenaŭ havis la necesajn manĝaĵojn.

Punadi per skorpioj. — III. Kroniko X, 11: Nova reĝo, Reĥabeam, estas proklamata super Judujo (la lando duiĝas: Jerobeam fariĝas reĝo super Izrael, kaj Reĥabeam, la filo de Salomono, super Judujo). Okaze de la kronado la hebreoj kunvenas kaj petas la novan reĝon (III. Kron. X, 4): „Via patro tro pezis nian jugon; nun deprenu iom de la malfacilaj laboroj de via patro, kaj de lia peza jugo, kiun li metis sur nin, kaj tiar ni servados al vi“. La reĝo interkonsiliĝas, sed la respondo (verso 14) estas laŭ la konsilo de la amikoj de la reĝo (verso 11): „Mia patro pezis nian jugon, sed mi ĝin ankoraŭ pli pezigos; mia patro vin punadis per vipoj, sed mi vin punados per skorpioj“.

Oni do celas per ĉi tiu esprimo tre severan mastron.

Nota: skorpio, la formo uzita de Prof. Collinson, ne estas Esperanta vorto. La oficiala nomo de tiu besto estas skorpio.

Meti sur sin sakaĵojn kaj cindron. — Jona III, 5 kaj 6: La profeto Jona estas sendata al la urbo Nineve, „kies malbonaĵoj leviĝis antaŭ Dion“ (Jona II, 2). Post kelkaj aventuroj Jona alvenas kaj laŭ la ordono de Dio li proklamas la pereon de la urbo post kvardek tagoj. La loĝantoj komencas penti, „kaj metis sur sin sakaĵojn, de la grandaj ĝis la malgrandaj inter ili. Kiam tion aŭdis la reĝo de Nineve, li leviĝis de sia trono, demetis de si sian reĝan veston, kovris sin per saktaĵo, kaj sidigis sur cindro“ (Jona III, 5 kaj 6).

La esprimo do diras, ke homo ekpentas.

Ilia lango alĝuiĝas al la palato. — Ijob XXIX, 10: Ijob, homo pia, sed treege provita de Dio, ploras kaj per tiuj vortoj li esprimas sian mizeron. Ĉiuj homoj, kiuj antaŭe ĉirkaŭ li agrable parolis, nun silentas; ili „metis la manon sur sian buŝon“ (verso 9) kaj la altranguoj ne parolas, ĉar „ilia lango alĝuiĝas al ilia palato“.

La saman esprimon la reĝo David uzas, kiam li preĝas en sia mizero (Psalmaro XXIII, 15 aŭ Psalmaro XXI, vd. noton sub „sur la manoj sktp.“): „Mia lango alĝuiĝas al mia palato“.

Ankaŭ la profeto Jeremia uzas la esprimon, kiam li plendas pri la mizero de la „filoj de Cion“ (t. e. la judoj): „La lango de suĉinfano alĝuiĝis al ĝia palato pro soifo“ (Plorkanto IV, 4).

Ĉu negro povas ŝanĝi sian haŭton? — Jeremia XIII, 23: La profeto Jeremia diras al la judoj, ke ili tiel alkutimiĝis al la malbono, ke ili eĉ ne plu povas transiri al bono, same kiel negro ne povas ŝanĝi la koloron de sia haŭto aŭ leĉparado siajn malkulojn.

La esprimo do montras neŝanĝeblan ŝtaton.

Meti la lampon sub grenmezurilon. — S. Mateo V, 15: En Sia granda parolado Jesuo instruas la disĉiplojn aŭ apostolojn, ke ili ne devas iri kaŝite tra la mondo, ĉar ili estas la lumo de la mondo kaj „kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon“.

La samon skribas S. Marko, en kies evangelio ni legas: „Kaj Jesuo diris al ili: Ĉu lampo enportiga, por esti metita sub grenmezurilon aŭ sub liton, kaj ne por stari sur la lampingo?“ (S. Marko IV, 21).

Kaj ankaŭ en tiu de S. Luko: „Kaj ekbruliginte lampon, oni ne kovras ĝin per vazo, aŭ forŝovas ĝin sub liton; sed metas ĝin sur lampingon, por ke la enirantoj povu vidi la lumon“ (S. Luko VIII, 16).

Nun la metafora uzado signifas: teni sian scion por si mem.

La salo sengustiga. — S. Mateo V, 13: Kristo tie diras al la disĉiploj aŭ apostoloj, ke ili estas la salo de la tero kaj aludas tie la gravan lokon; kiun okupas la apostoloj, kompare al la aliaj homoj. (Kp. ankaŭ ĉe S. Marko IX, 50 kaj S. Luko XIV, 34).

Tiel same nun la metafora uzado indikas ion gravan.

Loko, kie nek fineo nek rusto konsumas. — S. Mateo VII, 19: En Sia granda parolado Kristo instruas al la homoj „ne provizi al si trezorojn sur la tero, kie fineo kaj rusto konsumas“. Lia konsilo estas: „Sed provizu al vi trezorojn en la ĉielo, kie nek fineo nek rusto konsumas“. (Kp. ankaŭ en la epistolo de S. Jakobo V, 2 kaj 3).

Nun oni celas per tio tute sendanĝeran lokon, brulŝrankon.

Elporti la ŝarĝon de la tago kaj la varmego. — S. Mateo XX, 12: Kristo en ĉi tiu ĉapitro rakontas parabolon. Domomastro dungis laboristojn por sia ĝardeno kaj kontraktas kun ili po unu denaro por la tago. Tion ĉi li faris en la mateno; sed kelkajn horojn poste li ree dungas kelkajn kaj ankaŭ kun ili li kontraktas po unu denaro; same li faris je vesperigo. La diversaj aroj do ne laboris ĉiu same longe. Post la laboro ili venis, kaj kiam la unuaj venis, ili supozis, ke ili ricevos pli; kaj ili ankaŭ ricevis po unu denaro“. Tial ili ekmurmuris kaj diras al la mastro: „Tuj lastaj laboris nur unu horon, kaj vi faris ilin egalaj al ni, kiuj elportis la ŝarĝon de la tago kaj la varmego“.

Nun oni komprenas per tio labori multe por malalta salajro.

Elkribri la kulon kaj gluti la kamelon. — S. Mateo XXIII, 24: En ĉi tiu ĉapitro Kristo riproĉas la fariseojn, kiuj faras la vivon nebla al la ordinara homoj per ĉiaj ekstre-

maj leĝopreskriboj, kaj tamen ili mem forlasas pli gravajn aferojn. „Vi blindaj gvidantoj!, kiuj ekfibras la kulton kaj glutas la kameron“.

La esprimo nun signifas: ĝisekstreme preskribi al aliaj, sed mem ne teni la ordonojn.

Sur la manoj ili vin portos. — Psalmaro XCI, 12: La poeto de ĉi tiu psalmo pri-kantas la ŝirmon de Dio, kaj turnante sin al la leganto, la poeto diras: „Ĉar al Sijaj anĝeloj Li ordonis pri vi, ke ili vin gardu sur ĉiuj viaj vojoj; sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne falpuŝigu sur ŝtono per via piedo“ (verso 11 kaj 12). — La versoj estas cititaj de S. Luko IV, 11.

Signifo: fari glata la vojon kaj forigi per alia ĉiujn malfacilaĵojn.

Nota: En kelkaj psalmaroj oni ne trovas la esprimon en la 91-a psalmo; tie oni devas serĉi sub la 90-a (en multaj psalmaroj troveblaj per la komenco en ĝia latina traduko, kiu estas „Qui habitat“). La diferenco en la nombrado de psalmoj en la diversaj eldonoj fontas el tio, ke katolikaj eldonoj sekvas la nombradon de la grekaj tekstoj, kaj aliaj (i. a. la Esperanto-eldono de la tuta Biblio) la nombradon de la hebreaĵ, en kiuj psalmo 9-a estas duigita, tiel ke la sekvaj psalmoj diferencas per unu numero.

Tiel same la esprimon „ilia lango alligligas al la palato“ oni devas serĉi en kelkaj eldonoj sub psalmo XXI (latina nomo: „Deus, Deus meus“).

Dornego por la karno. — II. Korintanoj XII, 7: S. Paŭlo tie skribas ke li havas dornegojn por la karno, kiuj satano donis al li, por ke li ne tro altiĝu.

Oni ne scias, kio precize estis tiu dornego, sed nun oni celas per tio ion, kio ĝenas, malhelpas.

Ĝis ĉi tie Prof. Collinson. Nun mi volas doni ankoraŭ kelkajn ekzemplojn el propra sperto por poste fini per trarigardo tra la „Proverbaro Esperanta“, en kiu mi ankaŭ trovis plurajn ekzemplojn.

Fajrajn karbojn kolekti sur ies kapo. — Sentencoj XXV, 22: Salomono, la granda saĝulo, tie instruas, ke estas bone helpi siajn malamankojn por tiel konvinki ilin: „Se via malamanto estas malsata, manĝigu al ŝi panon; kaj se li estas soifa, trinkigu al li akvon; ĉar fajrajn karbojn vi kolektos sur ŝia kapo, kaj la Eternulo vin rekompencos“ (verso 21 kaj 22).

Helpi iun, kvankam tiu ne meritas tion.

Potencia ĉasisto. — Genezo X, 9: Unu el la pranepoj de Noa estis Nimrod, pri kiu ni legas: „Li estis potencia ĉasisto antaŭ la Eternulo; tial oni diras: Kiel Nimrod, potencia ĉasisto antaŭ la Eternulo“.

Nun oni celas per tio lertan metiiston. Kelkfoje oni ankaŭ diras: „Li estas vera Nimrod“ kaj tiam celas, ke la koncerno estas bona ĉasisto.

Vantaĵo de vantaĵoj. — La Predikanto I, 2: Salomono tie priskribas la vantaĵon de ĉio surtera (kaj kelkfoje ripetis la esprimon (ankaŭ en ĉapitro XIII, 8).

Nun oni indikas per la esprimo amuzojn ne ŝatatajn de la parolanto.

Voĉo de krianto. — Jesaja XL, 3: La profeto tie antaŭdiras la venonton Johanon la Baptiston, kiu laŭ la evangeliistoj ankaŭ staris predikante en la dezerto. La teksto de Jesaja: „Sonas voĉo de krianto: Pretigu en la dezerto la vojon de la Eternulo“ ofte estas tradukata alie (kaj en la lasta formo

ĝin citas la evangeliistoj; S. Mateo III, 3; S. Marko I, 3; S. Luko III, 4 kaj S. Johano I, 23): „Voĉo de krianto en la dezerto. Pretigu la vojon de la Eternulo“. Nur la lastan fononon oni uzas metafore kaj celas per ĝi homon, kiu sensukcese staras sola kaj pre-dikas.

Meti la manon en sian sinon. — Eliro IV, 6: Kiam Dio aperas al Moseo, la gvidonto de la hebreoj, tiu lasta ne voĉas kredi. Tiam Dio igas lin ekzameni sin mem kaj nur fidi al Dio. Moseo havas ĉe si bastonon. Kaj Dio diras al li: „Jetu ĝin sur la teron. Kaj li jetis ĝin sur la teron, kaj ĝi fariĝis serpento“ (verso 3). Post tio Moseo devas kapti la serponton je ĝia vosto kaj tiam la serpento ree fariĝas bastono. La nova signo de Dio estas, ke Li diras al Moseo: „Metu vian manon en vian sinon. Kaj li metis sian manon en sian sinon; kaj kiam li elprenis ĝin, jen lia mano estis leprokovrita kvazaŭ neĝo. Kaj Li diris: Remetu vian manon en vian sinon (kaj li remetis sian manon en sian sinon; kaj kiam li elprenis ĝin el sia sino, jen ĝi denove fariĝis kiel lia karno); kaj se ili ne kredos al vi kaj ne aŭskultos la voĉon de la unua signo, ili kredos al la voĉo de la alia signo“ (verso 6 kaj 7).

Ekzameni propran konsciencon aŭ deklari sin kulpa.

Iri laŭ la ĉefa publika vojo. — Nombroj XXII, 22: Izrael devas batali kontraŭ alia popolo. Sed por alveni tie, ili devas traŭri la regionon de alia (neŭtrala) reĝo. „Kaj Izrael sendis senditojn al Sifon, reĝo de la Amoridoj, por diri: Mi dezirus traŭri vian landon; ni ne devojiĝos sur kampon aŭ en vinbergardenon, ni ne trinkos akvon el puto; laŭ la ĉefa publika vojo ni iros, ĝis ni trapasos viajn limojn“ (verso 21 kaj 22).

Promesi fari nenium difekton. Alia signifo de la metafora uzado: agi tute malĉese.

Pendigi la harpojn. — Psalmaro CXXXVII, 2 (aŭ Psalmaro CXXXVI, t. e. en sia oficiala latina nomo „Super flumina“): La judoj kelkan tempon travivis en kaptiteco kaj pro siaj mizero kaj malĝojo ili ne plu ludis la harpon, sed kiel diras la psalmo: „Apud la riveroj de Babel ni sidis kaj ploris, rememorante Cionon. Sur la salikoj tie ni pendigis niajn harpojn“ (verso 1 kaj 2).

Ne plu okupi sin pri la poezio aktiva, t. e. ne plu versi.

Lami sur du flankoj. — I. Reĝoj XVlll, 21: Foje hebrea profeto kunvenis kun la pastroj de idolo por konvinki ilin pri la supereco de la hebrea Dio. Ambaŭ partioj konstruis altaron kaj la veto nun estis, ke laŭ interkonsento tiu Dio estos la pli granda, kiu mem bruligos la suraltaraĵon. La idolaj pastroj ekpreĝis kaj nenio okazis. Nun la hebrea profeto, eĉ malsekiginte la lignon de la altaro, ekpreĝis: „Aŭskultu min, ho Eternulo, aŭskultu min, por ke ĉi tiu popolo eksciis, ke Vi, Eternulo, estas Dio, kaj por ke Vi konvertu ilian koron returne. — Tiam stalis

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri recenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj prilingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. sim.

fajro de la Eternulo kaj konsumis la bruloferon (kaj la lignon kaj la ŝtonojn kaj la polvon; kaj la akvon, kiu estis en la foso, ĝi forlekis“ (verso 38 kaj 39). Unu el la plendoj kontraŭ la popolo dum tiu veto estis la ĝemkrio de la hebrea profeto: „Kiel longe ankoraŭ vi lamos sur du flankoj?“ (verso 21).

Dubi inter du aferoj (kaj heziti antaŭ la decido).

La peko kuŝas ĉe la pordo. — Genezo IV, 7: Eldiro de Dio al Kain (vd. supre), kiam li ofertas kaj lia ofero ne estas akceptata. Por averti lin, Dio instruas al li: „La peko kuŝas ĉe la pordo, kaj vin ĝi aspiras, sed vi regu super ĝi“.

Averto al homo, ke li devas sin gardi kontraŭ malbonagoj allogantaj.

Dezerto de popoloj. — Jefezekeel XX, 35: Ĉi tiun esprimon mi foje legis en rilato al Universala Kongreso de Esperanto. La profeto anoncas la „disversadon“ de la juda popolo pro ĝiaj malbonagoj; Dio diras: „Mi venigos vin en la dezerto de la popoloj, kaj tie Mi procesos kun vi“. Efektive ni scias, ke la judoj nun estas miksitaj inter ĉiuj popoloj de la tero, kvankam la promeso ankoraŭ valoras: „Mi venigos vin en la landon de Izrael, en la landon, pri kiu Mi levis Mian manon, ke Mi donos ĝin al viaj patroj“ (verso 42).

Kiu estas senpeka, tiu unua jetu ŝtonon.

— S. Johano VIII, 7: Oni alkondukas al Kristo virinon, kaptitan en adulto. Nun oni diras al Kristo, ke en la leĝo de Moseo estas priskribite ŝtonmortigi tian homon (oni vidu en la libro Levidoj XX, 10: „Se iu adultita kun edzinigita virino, se iu adultis kun la edzino de sia proksimumo, estu mortigitaj la adultinto kaj la adultintino“; kaj en Realdmono XXII, 22: „Se estos trovita viro, kuŝanta kun virino edzinigita, tiam oni mortigu ambaŭ, la viron, kiu kuŝis kun la virino, kaj la virinon“). Kristo tamen komprenis, ke la homoj nur demandis lin, kion fari kun la virino, por provi lin kaj tial Li respondas: „Kiu el vi estas senpeka, tiu unua jetu sur ŝi ŝtonon“.

Oni ne devas akuzi aliajn, se oni mem ne estas tute neniproĉebla.

Kiu staras, sin gardu, por ke li ne falu. — I. Korintanoj X, 12: S. Paŭlo en ĉi tiu epistolo instruas la Korintanojn, ke ili ne devas esti fieraj: „Tiu do, kiu opinias, ke li staras, sin gardu, por ke li ne falu“.

La metafora uzado havas la saman signifon.

Ludi la kompatema samariano. — S. Luko X, 30–38: Kristo rakontas parabolon. Viro vojaĝanta estas atakata de rabistoj, kiu lasas lin senvestigita sur la vojo. Nun pastro preteriras, sed anstataŭ helpi la malfeliĉulon, li preterpasas aliflanke de la vojo. Poste helpopastro preteriras; same. Sed fine samariano alvenas. La samarianoj estis tre malamankoj de la judoj. Sed tiu ja helpas lin, eĉ igas lin flegi en majbara gastejo.

Esti kompatema al homoj, kiuj ne apartenas al onia partio.

Blindulo, kondukanta blindulon. — S. Mateo XV, 14: Kristo komparas la fariseojn al blindaj homoj, kiuj estas gvidantoj de blinduloj. Tiel mallbone ili gvidas kaj „se blindulo kondukas blindulon, ambaŭ falos en fosajon“.

La metafora uzado estas la sama.

Kolekti sub siajn flugilojn. — S. Mateo XXIII, 37: Kristo plendas pri Jerusalemo kaj

espramas Sian deziron: „Kiom ofte Mi vojis kolekti viajn infanojn, kiel kokino kolektas sian idaron sub la flugilojn!”

Montri fortan amon al iu(j); sed ne sekse amo.

Perdita ŝafo. — S. Luko XV, 3—7: Nomo de parabolo de Kristo. Homo posedis cent ŝafojn, sed li perdas unu dum la vojiro. Nun li forlasas la naŭdek naŭ por serĉi tiun unu „perditan ŝafon“. Tiel same Kristo eliras por serĉi perdiĝintojn.

La metaforo klarigas sin mem.

(Daŭrigota.)

Prilingva babilaĵo.

Granato.

El la nomoj oni ofte ekkonas pli bone la objektojn aŭ gravajn faktojn.

Ekzemple la Esperanta vorto „ĉerizo“ certe devenas el la franca lingvo „cerise“, plue el la latina „cerasus“ kaj greka „kerasos“. „Kerasus“ estis greka koloniurbo ĉe la suda bordo de la Nigra Maro en ĉarma regiono mildklimata. Tie la romanaj soldatoj dum militiro de la generalo Lucullus (74—70 a. Kr.) unue trovis inter la multaj fruktantaj ankaŭ ĉerizojn, gustumis la agrablajn fruktojn, portis hejmen la kernojn, semis ilin kaj disvastigis okcidenten kaj norĉen.

Same en la Antaŭa Azio origine estas hejma al la fruktarbo, mirteca kreskaĵo, kies produktaĵoj kiel jam antikvatempe tiel ankoraŭ nun en sudlandoj estas ordinara nutraro, eĉ en nordaj landoj delikata ĝuaĵo, nome la iom doŝaj-acidetaj granatoj. La scienco termino estas „Punica granatum“. Ĉar la romanoj nomis ilin „mala Punica“ t. e. „pomoj Punikaj“, evidente tial ke oni ekkonis ilin en la ĝardenaĵoj de la iamaj Kartaganoj (loĝantaj sur la nordafrika marbordo kontraŭe al la insulo Sicilio); sed verŝajne tiuj estis eksportitaj la frukton el sia antikva patrolando: Fenikio, la siria bordlando. Ĝia kulturado disvastiĝis tra ĉiuj randlandoj de la Meza Maro, precipe en la suda Hispanujo, kie meze en fruktrikaj ĝardenaĵoj prosperas ĝis nun la famekonata grandurbo Granada.

En antikva Grekujo oni multe satis la kreskaĵon, eĉ la purpurkoloran floron kiel signon de arda amo. Ankoraŭ nuntempe ekzistas la kutimo, junan geedziĝan paron elrantan el la preĝejo ĵeti per granatoj; se tiuj krevas kaj la multnombraj kernoj elfalas, tio signifas estontan idaron. Do la granato estas kvazaŭ edzeca simbolo same kiel la mirto jam de jarmiloj.

Generale konata estas la mito pri la bela jundiino Persefone, kiun la malluma Hadeso dum florkolektaĵo forrabas kaj forkondukas en sian subteran regnon. Antaŭ ol, laŭ ordono de Zeŭso post insista peto de la multsufieranta patrino, li resendis la vingulino, li ruze donas al ŝi granatan kernon por manĝi. Sekve ŝi estiĝas lia legitima edzino kaj ne rajtas por ĉiam disiĝi, sed devas resti nur dum du trionoj de jaro en la supra mondo, la lastan trionon en la hadeso.

Ankaŭ la plastika arto de la grekoj ofte kiel insignon enmanigas granatojn al la marmoraj statuoj de eminentaj diinoj (Hera = Juno, Afrodite = Venuso).

Plue al la granato pro la enhavataj multegaj kernoj oni rilatigis la ideon de sennombra kvanto, abundo kaj prospero. Evidentiĝas el jena anekdoto, kiam tradicias la

greka historiisto Herodoto (IV, 143). Kiam la persa reĝo Darius (521—485 a. Kr.) estis manĝonta granatojn kaj rapide malfermis la unuan frukton, lia frato lin demandis, kion li deziras laŭ la sama kvanto, kiel la kerno estas en la granato; tiam li respondis: ke tiom da Megabazoj al li okazu pli vole ol la subigita Grekujo! Estis Megabazo la distingita amiko kaj kunhelpanto en militaj aferoj.

Cetere la latinlingva adjektivo „granatus“ signifas: provizita, abunda, plena je „grana“ t. e. grajnoj; „grano“ ankoraŭ nun estas uzata en la senco de trege malgranda pezo de apotekistoj (= 0,06 gramo).

Se oni sekigas la frukton, la ŝelo malmolliĝas, la pulpo sensukliĝas kaj malŝvelas, interne restas nur la amaso da kernoj, kiujn oni povas igi klakadi. Ĉi tiu fakto klarigas alian ideon esprimatan.

La itala vorto „granata“ kaj la franca „grenade“ signifas ne nur la preparolitan pomon, sed ankaŭ specon de — jetilo, nome tian, kiu en si kaŝas multajn malgrandajn kugletojn kvazaŭ grajnoj, same kiel la frukto multegajn kernojn; se la ĉirkaŭaĵo eksplode krevas, ili disiĝiĝas. En la germana lingvo oni diferencigas: der Granat (apfel) — die Granate, en Esperanto pli bone: „granato“ (laŭ la latina formo) kaj „grenado“ (laŭ franca modelo). Tiuj soldatoj, kiuj (en la 16-a jarcento) manuzis tiajn jetilojn, unue estis nomataj „grenadistoj“; la nomon retenis elektitaj trupoj en la prusa armeo de Frederiko la Granda kaj en la franca de la revolucia tempo. Eĉ dum la mondmilito „mangrenadoj“ kaj „grenad-jetiloj“ estis tre kutimaj.

Krome ekzistas „granato“ (france „grenat“, germane „Granat“) pro mineralo ŝatata kiel juvelŝtono (prefere malhelruĝa) — verŝajne nomata pro la grajna kvalito — kaj „granito“ (itale „granito“, france „granit“, germane „Granit“) pro la sama kaŭzo. Cetere „granita“ estas grajneca limonada glaciaĵo, kiun somere en la kafejoj-restoracioj de Suditalujo kaj Sicilio oni prefere ensorbas trumartere anstataŭ kafeo. Do ni revenas al frandaĵoj!

(Laŭ artikoleto de H. Lamer en „Wiener Studien“ III 7, 1926, p. 133).
Dr. J. Penndorf, Plauen.

LINGVA TRIBUNO

Benzeno.

En frua apernombro de „Lingva Kritiko“ aperis la nevera aserto, ke la vorto **benzino** devenas el la nomo de germana inventinto Benz (19-a jarcento). Fakte, la vorto en ĉiuj gravaj lingvoj devenas el benzoina gumo. Tion scias ĉiu apotekisto. Kvankam mi ne detale esploris la historion de tiu gumo, mi scias ke antaŭ jarcentoj oni eltiris benzoinacidon el unu speco de la gumo. Ĉirkaŭ centon da jaroj antaŭ la nuna tempo, oni unue „konvertis“ la acidon en „benzinon“ (plej bone, benzeno'n). Nur poste oni trovis benzenon en karbgudro. Ĉio el tio okazis longan tempon antaŭ la apliko de la elpensajoj de Benz.

Nuntempe, okazas ofta konfuzo pri la diversaj substancoj, kiujn oni nomas benzino aŭ benzeno. Benzeno estas, ĉi tie, pura substanco kun difinitaj ecoj; ĝi havas la formulon C_6H_6 kaj troviĝas en sufiĉa kvanto en karbgudro, sed ne ofte en kruda teroleo. Ĝi povas esti formita el benzacido. Germane, ĝi nomiĝas Benzol; angle, benzene

(en komerca lingvo ofte **benzol**); france, **benzène**.

La fluidaĵo, kiun oni nomas angle **benzine** aŭ **benzoline**, estas nepura substanco, eĉ teorie, sed miksaĵo de pluraj nedifinitaj hidrokarbaĵoj. Ĝi venas preskaŭ tute el teroleo post distilado. Pro tio, ke ĝi estas miksaĵo, sintezo ne estas ebla. Kiel komerca substanco, ĝi estas pli nova ol benzeno. Mi supozas ke oni donis al benzolino nomon similtantan al tiu de benzeno pro tio ke, kiel solvigo, benzolino estas ofta anstataŭaĵo de benzeno.

Benzeno estas la ĉirpunkto de multegaj hemiaĵoj, kiaj kolorigiloj, farmaciaĵoj, ktp. Benzino estas nur solvigo kaj bruĝotaĵo; kiel hemiaĵo, ĝia uzo estas preskaŭ nula.

Per tiu ĉi noto, mi deziras aliri la atenton, ne nur de vortaristoj, sed ankaŭ de ĉiu serioza esperantisto, al konfuzo, kiu daŭras en naciaj lingvoj, kaj kiu post iom enpenetris en nian lingvon.

Vere, estas nun vasta kampo por Esperanto en sciencaj rondoj, sed unue devas taŭgi la lingvo. Beletristiko estas kvazaŭ interna afero, sed la ebla scienca uzo de Esperanto estas aktualaĵo. Ni devos ekkonduki klarigojn kaj precizon, ne nur rilate al benzino kaj benzeno, sed ankaŭ rilate la nekonfuzelblajn hemiajn radikojn (angle benzil- kaj benzyl-). Ambaŭ devenas fakte ikaj vorte el benzeno. Ili diferencigas unu de la alia, sed antaŭ ol proponi Esperantajn radikojn je ili, mi deziras vidi klarecon ĉe la nomoj de du multuzataj substancoj: benzino kaj benzeno. H. N.

*

Ĉu povas ekzisti „geedzeco“?

En la lasta Heroldo-aldono „La Regno Virina“ multfoje troviĝis la vorto „edzeco“ en plurald kaj kun plej diversaj atributoj, kiuj al mi ŝajnas ne pravigeblaj. Ĉu oni, ekzemple, povas paroli pri „multegaj geedzeco“, multaj feliĉaj (aŭ malfeliĉaj) geedzeco“ ktp.? Al mi tiu esprimmaniero ŝajnas germanismo, ĉar en la germana la vorto „Ehe“ (laŭ Einemann traduko de geedzeco) ja fakte havas krom la abstrakta ankaŭ kvazaŭ konkretan signifon, por kiu lasta la angla kaj franca lingvoj tamen uzas malsamajn vortojn. Miaopinie temas esence pri la eblo aŭ neblo uzi la afikson „eco“ diverssence, do ne sole por esprimi kvaliton. Kiel memstara vorto „eco“ ja estas tute illekcebila, ekz.: „Krom kelkaj malbonaj ecoj li (ŝi, ĝi) havis multajn bonegajn“. Sed kiel afikso la „eco“ ŝajnas iel rigidiĝi la ĉefan vorton; almenaŭ mi neniam legis pri „viveco“, riĉeco, diligentejoj“ ktp., nek vidis tiajn vortojn akompanataj de atributoj krom nur gradaj, tiaj kiaj estas „multa“ aŭ „granda“ (kun singularo!).

Do, se mi pravus, la skribinto de la artiklo devos estonte esprimi la volitan ideon per „geedzoj feliĉaj (aŭ malfeliĉaj) en sia geedza vivo“, aŭ „homoj — en sia geedza kunvivo“ ktp.; la vorton „edzeco“ li tiam uzos nur en frazoj, ekz., tiaj: „Dum nia lasta kunveno oni diskutis multe pri la demando, ĉu edzeca, ĉu fraŭleca stato estas preferinda“.

A. B.

Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.